

Joseph Döpjohann,
La maljuna arbo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Jam multajn jarojn staras
maljuna arbo jen,
ĝi vidis homojn veni
kaj iri sen reven'.

Infanojn ĝoje ludi
ĝi vidis apud si;
sed ankaŭ foje plori
li vidis tiujn ĉi.

La arbo maljuniĝis,
kun tiu ankaŭ mi;
la temp' ne haltas, fluas²
estonten daŭre ĝi.

Se iam almetiĝos
estonte la haki',
vi tiam ne lamentu,
toleru en trankvil'.

...

²aŭ: la tempo ne halteblas,
forfluas daŭre ĝi.

*Traduko de la Basgermana poemo “De aolle Boom” de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-02-24.*

MR-400-1 / Arg-248-502 (2004-06-30 15:24:50)

Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro “Liäbensbeller” (“Vivobildoj”), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.